# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

N° 215 JANUARO 2003

La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sume: 10 €

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a*, *preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

| **Motif de non distribution** | Périodique Semi-routé |
|---|---|
| ☐ Adresse insuffisante | **PORT PAYE** |
| ☐ N'habite pas à l'adresse | COLMAR (68) |
| ☐ Refusé | |
| ☐ Autres | |

PRESSE
DISTRIBUÉ PAR
LA POSTE

COLMAR

Dispensé de timbrage

Surkovrile

Esperanto en la Placo Sankta Petro en ROMO dum Kristnasko 2002.
La Papo diris siajn salutojn en 62 lingvoj, inkluzive de Esperanto
.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 31.a de marto 2003. Venonta bulteno aperos komence de aprilo .

Finpresado la 10/02/2003

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 215 Januaro 2003**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro HEROUX
Maison St-Joseph
26400 ALLEX
Peranto IKUE:
S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL
Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com

# Le Mot du Président

Une nouvelle année commence avec la volonté de continuer à agir pour faire avancer l'usage de l'Esperanto.

Certes la tache n'est pas facile. Nous sommes dénués de puissance et les mass-médias nous ignorent, quand elles ne nous tournent pas en dérision. La propagation de notre langue se heurte aux moyens considérables dont profitent les super-puissances pour favoriser leurs langues et leurs cultures. Nous ne pouvons fermer les yeux et nier que l'anglais - ou plutôt - l'anglo-américain jouit d'une hégémonie que personne ne met maintenant en doute.

Ce n'est pas une raison sufisante pour renoncer à notre idéal. C'est en pratiquant l'espéranto que nous démontrons sa beauté et son utilité.

Nous n'avons pas à combattre ou refuser les autres langues, qui s'arrogent le droit d'être internationales, alors qu'elles ne sont que le moyen d'imposer une culture étrangère à la nôtre.

Pour nous l'espéranto doit rester signe d'espoir, car lui seul n'est lié à aucune puissance politique; lui seul est indépendant de tout pouvoir étatique; lui seul est gage de liberté et de respect des différentes cultures. C'est dans cet esprit que l'esperanto apportera sa propre contribution pour que les diverses cultures, au lieu de se fondre en une seule, conservent leurs caractères et soient connues de tous.

Nous savons que les langues internationales liés à une puissance politique sont appelées à disparaitre. Qui aujourd'hui, alors que le Monde Romain a disparu, oserait soutenir que le latin est une langue internationale? L'espéranto, parce qu'il est indépendant et libre de tout lien politique, est apte à s'imposer dans l'avenir.

Gardons donc notre espérance et disons nous les uns aux autres

BONNE et HEUREUSE ANNEE 2003.

# La Bileto de la prezidanto

Komenciĝas nova jaro kune kun la deziro daŭre agadi por progresigi la uzadon de Esperanto.

Certe la afero ne estas facila. Ni estas sen povo kaj la presmedioj ignoras nin, kiam ili ne mokas nin. La disvastigo de nia lingvo frontas la gravajn rimedojn, kiujn la grandaj potencoj posedas por favorigi siajn lingvojn kaj kulturon . Ni ne devas fermi la okulojn kaj nei, ke la angla lingvo - aù pli precize - la angla-usona lingvo ĝuas hegemonion, pri kiu neniu nun dubas.

Tio ne estas sufiĉa kialo por rezigni pri nia idealo. Praktikante la esperantan lingvon, ni pruvos ĝian belecon kaj utilecon.

Ni ne kontraùstaros aù rifuzos la aliajn lingvojn, kiuj arogas al si la rajton esti internaciaj, kiam ili estas nur rimedoj por imponi kulturon fremdan al la nia.

Por ni Esperanto restos espersignon, ĉar ĝi sola estas ne ligata al iu ajn politika potenco: ĝi sola estas sendependa de ĉia ŝtata povo : ĝi sola estas garantiaĵo pri libereco kaj respekto de la diversaj kulturoj. Ĉi-intence Esperanto alportos sian propran dinamikon kaj sian kontribuon, por ke la diversaj kulturoj, anstataù ol fandiĝi en unu sola, konservu siajn karakterizojn kaj estu konataj de ĉiuj.

Ni bone scias, ke la internaciaj lingvoj,ligitaj al iu ajn politika potenco iun tagon malaperos . Kiu hodiaù, kiam la Romia Imperio malaperis, kuraĝus proklami, ke la latino estas internacia lingvo ? Esperanto, ĉar ĝi estas sendependa kaj libera de iu ajn politika ligilo, kapablas imponi sin estontece.

Do ni konservu nian esperon kaj ni deziru unu al la aliaj reciproke

*BONAN kaj FELIĈAN NOVJARON 2003*

## UNUECO

La Eklezio estas unu ;
ĝi formas homamason
ĉiam pli ampleksan
dank'al fekundeco ĉiam pli forta.

Kiel la sunradioj estas multnombraj
Tiel la sama lumo estas unika;
Multaj estas la arbobranĉoj
Sed unika estas la vivoplena trunko.

El unu sola fontano venas multaj riveretoj,
kaj kvankam ilia multeco venas
Nur de la superabundo de la akvoj,
Ilia deveno tamen estas unika.

Lumigita per la lumo de la Sinjoro,
La Eklezio disdonas siajn radiojn en la mondon
Sed unika estas ĝia lumo ĉien disvastigita,
Sen ke la unueco de ĝia korpo estas pecigita.

S-ta Cipriano, episkopo en Kartaĝo.



## AGADRAPORTO POR LA AGADJARO 2001-02

De la 1-a de oktobro 2001 ĝis la 30-an de septembro 2002, nia asocio ekkonis gravajn kaj valorajn okazaĵojn.

Ni ĝoje festis la sacerdotan jubileon de nia religia konsilanto, Pastro Héroux, kiu ricevis la pastrecon la 7-an de oktobro 1951 . Ni denove gratulas lin pro lia sindonemo al nia movado.

Enketo farita inter niaj membroj alportis bonan rezulton kaj ebligis konatigi iliajn dezirojn pri nia agado. Konsekvence ni decidis kongresi tuj antaŭ la nacia kongreso en urbo proksima al tiu ĉi. Kiam ni ne kongresos, nia ĝenerala kunveno okazos en la kadro de la nacia kongreso.

La plej grava punkto de nia agado estas la kontrakto de reciproka kunlaboro farita kun Esperanto-France, kiu alportas al nia asocio pli intensan partoprenon en la franca esperanto movado. Pro tiu kontakto ni havis nian ĝeneralan kunvenon en la kadro de la nacia kongreso en Strasburgo dum la Pentekosta semajnfino. Pastro Héroux diservis por la kongresanoj en la preĝejo Sta Petro la Juna apud kongresejo.

Dum la ĝenerala kunveno estis aprobita ŝanĝo de statuto, kiu fariĝis tiamaniere pli adoptata al nia agado.

Kiel pasintjare S-roj Bessière kaj Pons partoprenis la kongreson de la italaj katolikaj esperantistoj en Marina di Pietrasanta dum septembro 2002.

Dum la pasinta agadjaro ni bedaŭris la forpasojn de S-ino Berthaux kaj S-ro Vanspranghe.

Je la fino de septembro 2002 nia asocio nombris 122 membrojn do kvar malpli ol en la agadjaro 2000-2001.

La asocio volonte akceptos ĉiujn esperantistojn favorajn al nia idealo.

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 16-A DE OKTOBRO 2002 EN PARIZO.

Ĉeestis: S-ro Bessière,S-ino Abada-Simon,F-inoj Chaney, Hervier, Michel, P° Héroux,S-roj Chevalier,Lafargue,Pons,Villeneuve,S-ro Texier (kiel delegito de UFE)

Observis: F-ino Simonet

La komitato decidis konkordigi sian agadjaron kun tiuj de la ĉefaj aliaj esperantaj asocioj. La agadjaro de nia asocio do ne plu estos la kalendara jaro (I-a de januaro - 31-a de decembro) sed la periodo de la 1a de oktobro ĝis la 30-a de septembro.

Por anstataŭigi S-ron Colleu, la komitato elektis S-ron Chevalier, kiel helpkasiston.

S-ro Bessière konfirmis, ke li ne denove kandidatiĝos, kiel komitatano kaj prezidanto.

La nacia kongreso de UFE okazos en Baŭgé okaze de la Ĉielira Festo : nia asocio kongresos tuj antaŭ la nacia kongreso en Centre Notre Dame du Cêne 72300 VION, 5km for de Sablé (Sarthe).

La prezidanto raportis pri la nacia kongreso de UFE en Strasburgo kaj pri nia ĝenerala kunveno, kiu okazis en la kadro de tiu kongreso. Li informis pri la kontrakto de reciproka kunlaboro kun UFE kaj pri la ŝanĝo de la statuto de nia asocio.

La komitato decidis daŭrigi la reklamon pri nia asocio en La Monde de l'Esperanto pere de pagitaj anoncoj.

P° Héroux klopodos organizi, venontan oktobron, en Parizo diservon por la parizaj esperantistoj.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la mardon la 21-an de januaro 2003.

# ACCORD

Entre ,
l'association "Espéranto-France" dont le siège est situé au 4bis, Rue de la Cerisaie F-75004 PARIS, représentée par son président Claude Longue-Epée,
Et,
l'association thématique "Association Catholique Française pour l'Espéranto", dont le siège est situé à 55, Rue Corvisart F-75013 PARIS, chez Mademoiselle A.M Chaney,
représentée par son président Albert Bessière ;

Il est convenu ce qui suit :

1) Aux termes du présent accord, les deux associations s'engagent à travailler en poursuivant un objectif commun pour la promotion et la propagation de l'espéranto, et à s'aider mutuellement dans des actions visant à cet objectif et à l'échelon national .

2) Dans le cadre de son adhésion à "Esperanto-France", l'Association Catholique Française pour l'Espéranto"
- a produit ses propres statuts , en conformité avec ceux d'Esperanto-France, ainsi que son rapport d'activité, son rapport financier et la liste de ses membres pour l'année 2001 ;
- s'engage à respecter les statuts et le règlement intérieur d'Esperanto-France, approuvés par l'assemblée générale d'Esperanto-France le 3 juin 2000, ainsi que leurs modifications décidées le 22 juin 2002 et leurs modifications ultérieures;
- s'engage à informer Espéranto-France de toute modification ultérieure apportée à ses statuts ou à son règlement intérieur et, de façon plus générale, de toute modification pouvant entrainer un avenant au présent accord.

3) Espéranto-France s'engage à :
- informer l'Association Catholique Française pour l'Espéranto de toute modification de ses statuts ou de son règlement intérieur et, de façon plus générale de tout changement pouvant entrainer un avenant au présent accord.

4) Dans le cadre du présent accord, l'Association Catholique Française pour l'Espéranto désignera un représentant titulaire et un représentant suppléant au sein du Conseil d'administration d'Espéranto-France. Ces représentants , titulaire et suppléant, seront désignés chaque année et leurs mandats seront renouvelables par tacite reconduction. Ce représentant aura dans le Conseil d'Administration d'Espéranto-France voix délibérative et droit de vote.
De même, Espéranto-France désignera un représentant pour siéger au Conseil d'Administration de l'Association Catholique Française pour l'Espéranto.

5) Le présent accord est valable pour trois ans et renouvelable chaque année par tacite reconduction sauf dénonciation avec un préavis de 6 mois.

Fait à Paris en deux exemplaires originaux
Le 06 novembre 2002.


*"Le Président d'Espéranto-France*
*et Le Président de l'Association Catholique Française pour l'Espéranto".*

# KONGRESO 2003

La venonta kongreso okazos de la lundo la 26-a ĝis la jaŭdo la 29-a de majo 2003 en "Centre Notre-Dame du Chêne " 72300 VION (Tel: 02 43 95 48 01) . Tiu ĉi situas je 5 km de Sablé, kie staras la fervoja stacidomo . Taksio aŭ privata samideana aŭtomobilo atendos vin.
La prezo estas 135 euroj; ĝi entenas la tranoktadon, la tri manĝojn kaj la mardan ekskurson .
La aliĝkotizo estas :
- 20 eŭroj por unuopulo
- 26 eŭroj por paro

Senpaga aliĝo por junuloj ĝis 25-jara, pastro, religiul(ino)o, alilandano,blindulo.
La limdato por aliĝi estas <u>la 10-a de aprilo 2003.</u>

La aliĝilo, <u>kune kun la pago</u> al Association Catholique française pour l'espéranto, estos sendita al S-ro Villeneuve, 14 Rue du Clair de Lune 91 530 ST CHERON .
Oni devos alporti siajn tualettukojn.





# KONGRESPROGRAMO

<u>Lundon la 26-an de majo 2003</u>

posttagmeze : akcepto de la partoprenantoj
18.00 (se eblas ) Diservo
19.30 Vespermanĝo
21.00 Interkona vespero, ekzercado de la kantoj.

<u>Mardon la 27-an de majo 2003</u>

9.30 Prelego de P° Girault pri "Interreligiaj Rilatoj"
12.30 Tagmanĝo
14.45 Ekskurso al la abatejo Solesmes
18.00 Diservo
19.30 Vespermanĝo
21.00 Distra vespero

<u>Merkredon la 28-an de majo 2003</u>

9.30 Ĝenerala kunveno
12.30 Tagmanĝo
14.45 Promenado en la parko, Diaporama-projekcio, vizito al la pilgrimbutiko.
18.00 Diservo
19.30 Vespermanĝo
21.00 Adiaŭa vespero

<u>Jaŭdon la 29-an de majo 2003</u>

9.30 Komitatkunveno
11.30 Kongresfermo
12.30 Tagmanĝo
Posttagmeze foriro al sia hejmo aŭ al la Nacia kongreso en Baugé.

## *KONGRESA ALIĜILO*

**(Tondu aŭ kopiu kaj sendu al)**
S-ro VILLENEUVE ,
14 Rue Clair de Lune 91530 SAINT-CHERON
nepre antaŭ la **10-a de aprilo 2003)**

Nomo kaj voknomo : ..............................

Adreso ..................................................

Naskiĝdato (nur por junuloj) ......................

Mi aliĝas al la kongreso en ND du Chêne kaj pagas al Association Catholique française pour l'Esperanto.:

Aliĝkotizo : ............................
Restado : ............................
Donaco (libervola) :..............................

Mi deziras loĝi : en unulita ĉambro
en dulita ĉambro kaj dividi ĝin
kun ..................
Mi alvenos per aŭto
trajne en Sablé je la ..............horo

Mi partoprenos en la nacia kongreso : JES NE

Mi bone notis, ke mi devos alporti miajn tualettukojn.

**ALIĜU TUJ !**

## KONGRESO APUD MARO

De la 13-a ĝis la 17-a de septembro 2002 , la italaj katolikaj esperantistoj kongresis en Marina di Pietrasanta, apud Viareggio.

Pli ol sesdek personoj partoprenis en ĝi : inter ili kvin francoj.

Agrable starigita en la religia domo "Villa Aurora", la kongresanoj pritraktis la temon: "Babilono, Babelturo kaj Pentekosto" laŭ la vidpunkto de esperantistoj, por konkludi, ke unika lingvo por ĉiuj estas simbolo de la unueco de la Fido en la koroj de ĉiu kristano.


Sed la kongresanoj ankaŭ ekskursis en la mezepoka urbo Pietrasanta per trajneto, admirante la belan katedralon kaj vizitante la naskiĝdomon de Carducci, poeto kaj politikisto.

Tutan tagon oni dediĉis al la malkovro de Luko (Lucques), antikva mezepoka komunumo . Tie la preĝejoj estas bele ornamitaj per marmoro kaj riĉaj artaĵoj, meze de la 4-kilometra defendmuro, kiu entenas la urbon.

Reveninte al la kongresejo, halto en Torre del Lago ebligis viziton al la domo de la fama muzikisto Puccini.

Kiel kutime la korvarmeco de niaj italaj gefratoj alportis al la tuta aranĝo simpation kaj fratan etoson.

A.B



## JARO 2003 - LA JARO DE LA SANKTA ROZARIO

La 16-an de oktobro 2002 dum ĝenerala aŭdienco subskribis Sankta Patro Johano Paŭlo la II-a novan apostolan leteron pri preĝo de la Rozario nomatan *Rosarium Virginis Mariae* (*Rozario de la Virgulino Maria*) kaj samtempe li deklaris Jaron de la Rozario, kiu daŭros ekde la oktobro 2002 ĝis la oktobro 2003.

En sia meditado la Papo memorigas konceptojn de tiu ĉi specifa preĝo de la dua jarmilo esprimitajn fare de liaj antaŭuloj. Ĝi estas la preĝo honore al Maria, sed kiu estas centrigita al Kristo. Centro de la Rozario estas Kristo, kaj Maria akompanas kaj inspiras nian preĝon, Ŝi preĝas kun ni kaj kondukas nin al Kristo, al ununura kaj universala Savinto.

La Papo al la jam tradicie ekzistantaj misteroj aldonis pluajn kvin, kiujn li nomis "Misteroj de la Lumo", ĉar Jesuo estas la lumo de la mondo. Jen la novaj rozariaj misteroj:

1. ... Jesuo, kiu estis baptita en Jordano
2. ... Jesuo, kiu revelaciis en Kana sian Dian potencon
3. ... Jesuo, kiu heroldis Dian Regnon kaj alvokadis al pentofarado
4. ... Jesuo, kiu sur la Monto de Transfiguriĝo revelaciis sian gloron
5. ... Jesuo, kiu estigis Eŭkaristion

Per aldono de la kvin novaj rozariaj misteroj la Papo Johano Paŭlo la II-a ligis sin al la Papo Pio la V-a, kiu en la jaro 1569 estigis ĝis nun uzatan formon de la rozaria preĝo. Dum la aranĝoj de la katolikaj esperantistoj ni eluzu okazojn por la komuna preĝado de la Rozario, kiu estas forta kaj efika armilo, donanta pacon al la mondo. Per tiu ĉi armilo la homaro batalu kontraŭ malbono kaj certe ĝi venkos kaj per ĝi ekregos paco de Kristo sur la mondo.

> *La Rozario estas mia preĝo. El la ĉielo mi venis, por peti vin pri ĝi, ĉar ĝi estas armilo, kiun vi devas uzadi en ĉi tiuj tempoj de la granda batalo. Kaj ĝi estas signo de mia certa venko.*
>
> *Mia venko realiĝos, kiam satano kun sia potenca armeo de ĉiuj inferaj spiritoj estos enfermita en sian regnon de la mallumo kaj morto, de kie li ne plu povos eliradi, por damaĝi la mondon.*
>
> Fragmento de mesaĝo de la Virgulino Maria donita al sac. Gobbi la 7-an de oktobro 1992 en Blumenfeld (Germanio) en la festotago de V. Maria, Reĝino de la Sankta Rozario.

# Kalendaro

2003 RIMINI (Italio)
de la 30/08 ĝis la 06/09
- 16-a Ekumena Kongreso
- 56-a IKUE Kongreso
- 53-a KELI Kongreso

(informoj en venonta bulteno)

## Kotiztabelo 2003

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 25 eùroj

Peranto : S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL.

al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de S-ro Pons

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto"

unuopulo : 10 eùroj
geedza paro : 13 eùroj
gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : 5 eùroj
bonfaranto : 30 eùroj

Pagu al la kasisto :S-ro VILLENEUVE G.
14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de Association Catholique Française pour l'esperanto

Dépot légal : 4eme trimestre 2002 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO